

Tagiĝo 24

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/II,
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

REGIONA KONFERENCO *de esperanta junularo*

La 20-an de februaro estis kunvokita en Brno la junulara konferenco el kiu ni alportas kelkajn ideojn el la prelego de ĉefdelegito de EJ kaj poste la problemojn dum la kunveno solvitaj.

Karaj gesamideanoj!

Ni denove eluzas la okazon de maskobalo, kiun s-anoj el Brno preparis por nia amuzo, sed ankaŭ por ke ni povu kunveni el diversaj lokoj de nia respubliko, por povi pritrakti niajn dolorojn en poresperanta laboro, por povi refervorigi la jam malvarmiĝantaj s-anojn por nia afero. Vere, kredo, la ĉiu nia renkonto en formo de tutŝtataj kunvenoj donas al ni la memkonfidon, ke laboro de ĉiu el ni estas farata por la komuna celo, ke nia laboro ne estas nur ia senutila perdado de tempo, male ni ekkonas ke ni faras la laboron bonan kaj pacan.

Mi bone konas la situacion kiam en la grupo ekestas la periodo, kiam ŝajnas jam ĉio vana, senespera, kiam ŝajnas ke jam estas pli bone ĉion lasi kaj dediĉi sin al aliaj amuzoj. Jes, estas priodoj tiaj, kiam la aktivigo de niaj membroj malaltiĝas, la grupanoj komencas ne regule vizitadi la kunvenojn kaj ni eĉ ne scias kial tio okazas. Kaj ĉu vi scias la kaŭzon? La kaŭzo de malsukcesoj estas en ni mem.

Nur ni enpenetru en niajn korojn kaj revenu iom malantaŭen, kaj memoru kial ni havis tiel sukcesajn kunvenojn. Ni devas konfesi, - jes, mi estis pli aktiva, mi helpis al la programo de kunveno, kaj ĉu mi faras tion nun? Ĉu mi ne fidis nur je miaj amikoj, ke tiuj ion preparos, kaj mi faros tion venonte? Nur foje ne estas preciza kaj valora programo dum la kunveno kaj la malfervoraj s-anoj jam venonte ne venos, aŭ venos malfrue. La krizo tiel komenciĝas.

Mi scias, ke eblecoj ne estas ĉio la samaj, sed la sama, povas esti kreita la medio - amika kolektiva. Ni estu unu al alia bonaj amikoj, ni pardonu la mankojn de sia kunulo kaj ĉiu el ni aktive klopodu pliriĉigi la nian kunlaboron.

Ni ne tro longe diskutu pri tiaj temoj. Ni diru al ni nur jenon. Ĉiu el ni devas scii kial ni lernas Esperanton, ĉiu el ni devas konscii ke ni estas ĉiam ankoraŭ nur pioniroj de nia movado, ke ni devas ankoraŭ nur venki la obstaklojn kiuj staras en nia vojo sur kiu ni iras al nia celo.

Ni devas fidi plejparte nur al niaj propraj fortoj kaj ne atendi grandan helpon de aliaj. Ni provu ĉiujn eblecojn, eĉ se ili ŝajnas al ni tro infanaj. Ĉiu el ni devas venki tiun infanaĝon de loka esp. movado, por povi nur pli poste ĝui el la fruktoj.

Kia asters nia tasko en nuna tempo, kiam la Montevidea konferenco de UNESCO alportis al ni almenaŭ malfortan lumon, kiu iom pli bone ebligas rigardi al ni antaŭen. Neniu el ni povas diri, ke decido de UNESCO alportis jam tujan venkon de Esperanto, sed tamen ni povas konstati ke pri nia lingvo estis diskutite en tia internacia forumo kaj la multaj landoj jam trovis nian laboron utilan. Nun la nacioj volas antaŭ ol diri la finan "jes" – iom rigardi kiel ni estas persistaj, kaj ĉu ni jam povas sufiĉe firme stari sur la fundamentoj antaŭe kreitaj ... Nun ni devas montri, ke ni ne laciĝas en

la la laboro, male ni devas ankoraŭ pli intensive ĵeti nin en la laboron por prepari la vojon por deviga instruado en lernejoj.

Ni devas jam kredi, ke la venko de nia movado ne estas malproksime. Ni firme povas esperi, ke nia genaracio jam spertos la finan fazon de la longa preparepoko. Poste jam estos superfluaĵaj iaj Esperanto rondoj, kiam ŝtatoj mem prenos la aferon en manojn kaj zorgas pri la instruado, kiel nun zorgas pri la instruado en lernejoj de ĉiuj lernejobjektoj. Poste nia pionira tasko perdas sian signifon, ĉar estas por tio elektitaj postenoj ŝtate pagataj - kaj ni nur ĝuas la fruktojn en internacia mezurilo. En la komenciĝanta atomepoko al ĉiu estas klare, ke unu lingvo komuna por tuta homaro estas neevitebla.

Kelkajn vortojn mi nun prenas el gazeto Heroldo de Esperanto:

"Kiu batalas por Esperanto, tiu batalas por la Paco! Tio ne estas nura diraĵo, sed esenca veraĵo. Kaj kiu batalas kontraŭ Esperanto, tiu – konscie aŭ ne – batalas ankaŭ kontraŭ la Paco. Jen alia esenca veraĵo. Nia Esperanto estas bona afero. Tion ni esperantistoj scias kaj konscias. Tial ni ne lasas ĝin. Tial ni plu laboros kaj batalos por ĝi kun sama aŭ eĉ pli arda fervoro....."

Per kelkaj vortoj estis aluditaj la etaj ŝanĝoj en la junulara konkurso pri scio kiuj estis aprobitaj dum la Interbabilado en Ostrava novembro, kaj kiuj estis publikigitaj en 22-a numero de Tagiĝo. Estis notite ke ĉiamaj ŝanĝoj ne tro helpas al vigla laboro de niaj grupoj kaj ke ni evitos fari tion venonte. Dumtempe postulos Centrejo, ke grupoj plenumu ĉiujn kondiĉojn el la konkurso kaj sendadu regule la raportojn al la Reg. delegitoj.

Li finis per devizo, kiun s-ano Werner metis en la ŝildon de grupoj en lia regiono:

"Subtenu la decidon en niaj membroj, por ke ili fariĝu ĉiuj kvalitaj esperantistoj - instruistoj de Esperanto."

Centraĵo

LA PROGRAMO de junulara kunveno

La kunveno estis malfermita je la 9,30 horo en la Hotelo Slovan kun pli ol 50 delegitoj kaj gastoj, inter kiuj estis ankaŭ konataj kaj pioniroj de E-movado en Brno - ges-anoj Jos. Vondroušek, Jiří Kořínek kaj Věra Borská. S-ano Werner, junulara reg. delegito de suda Moravio salutis ĉiujn ĉeestantojn, klarigis, la taskojn de la kunveno kaj difinis la programon de ĝi. La programo konsistis el du partoj:

1. Necesaj premisoj de nia movado. 2. Somera Esperanto-Tendaro - SET

Post la prelego de s-ano Kuzník donis vorton s-ano Werner al ĉiuj lokaj delegitoj de la regiona kaj al ceteraj. Poste resumis ĉiujn raportojn kaj pridiskutis ĉiujn karakterizaĵojn de unuopaj grupoj, iliajn zorgojn kaj sukcesojn kaj konsilis plu daŭrigi nian laboron.

La traktado fluis kontentige. La ĉefa kunsido daŭris precize du horojn. Kiel plua tasko de nia kunveno estis solvi la demandon de aranĝota Somera Esperanto-Tendaro de Junularo, kiu ĉi jare okazos denove dum 3 etapoj po 14 tagoj, en proksimeco de akvobaro Vranov. Estis elektita la preparkomitato de SET kiu post la ĉefa kunsido kunvenis ankoraŭ foje kaj starigis por unuopaj membroj precizajn taskojn por bone prepari nian instruadon kaj sukceson de la tendaro. Ankaŭ altlernejanoj aparte kunvenis post la ĉefa kunsido.

S-ano Kořínek, Vondroušek el Brno kaj aliaj ankoraŭ kontribuis per kelkaj vortoj al nia kunveno, taksinte la laboron de junularoj kaj dezirinte al ni multan sukceson. Post la tagmezo estis la konferenco finita kaj ĉiuj kun nova fervoro kaj entuziamigitaj adiaŭis por en siaj lokoj denove plivigligi nian Esperanto-movadon.

Sabate vespere okazis la tradicia Maskobalo de Esperantista klubo en Brno, muzikis altlerneja kolektivo "Javorina", Spegula salono de hotelo Slovan estis tro malgranda por 100 - 150 dancemaj, samideanoj, inter ili 50 eksterlandaj gastoj. Dum la vespero havis eblecon ĉiu travivi kelkajn horojn en amika medio de s-anoj. Gajeco kaj bonhumoro estis plej bona rekompenco por s-anoj el Brno kaj ni povas nur ankoraŭ foje danki, ke ili preparis por ni tiel belajn du tagojn.

Rezolucio de la Junulara konferenco, kiu estas destinita por ĉiuj grupoj de Esp. Junularo, estis unuanime akceptita:

1. Subteni en niaj mmembroj entuziasmon, kiu estas fonto de de nia energio kaj kaŭzo de iniciativa agado.
2. Perfektan lingvoscion kompreni kiel fundamentan postulon kaj garantion de konstanta intereso.
3. Ne permesi, ke niajn grupojn ĝenu kia ajn interna disharmonio, kiu povus grupon senigi eĉ de homoj kun entuziasmo kaj perfekta lingvoscio.
4. Ĉiu grupo havu bonajn rilatojn kun estraro de Kulturdomoj, Entreprenaj Klubo de ROH kaj kun Komitatoj de Pacdefendantoj.
5. Ne nur paroli pri intergrupa kunlaboro, sed precipe realigadi ĝin almenaŭ per plenumado de postuloj kaj instigoj de la Centrejo.
6. Respekti labormanieron de unuopaj grupoj, kiu konformas kun lokaj kondiĉoj kaj kki ne danĝerigos la movadon.

PREPARKOMITATO se SET:

Estro:	Jaroslav H a b e š, Třebíč, Podklášteří 114
Sekretariejo:	Jan Werner, Brno, Helceletova 16
Teknikaj kaj financaj aferoj:	Jaroslav Habeš
Instruado:	Drahomír Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3
Programa zorganto de la 1-a etapo:	Josef Bublan, Sucheniova 28, Třebíč
Programa zorg. de la 2-a etapo:	vakas
Programa zoranto de la 3-a etapo:	Drahomír Kočvara

NI HELPAS AL NI!

Kdo má zájem o 2 amatér. fotografie z Prahy ze zájezdu na esp. mikulášský večírek, necht' napiše na adresu: Jar. Rybáčková, Pardubice, Okrouhlík 21

Ni dankas al ĉiuj, kiuj afable alsendis la postulitajn N-rojn de Tagiĝo.

Korespondi deziras: K-do Borislav A. Velov, "Stalin" 5, Goce Delĉev, Bulgario, serĉas korespondantojn por sia 50-ana Esp. grupo. Respondo certa.

Germanio: Karaj gekamaradoj! En mia kolektivo por popolaro ekzistas Esp. kurso. Ĉiuj nun deziras korespondi kun gekamaradoj el la ĉeĥoslovaka popola respubliko. Entute 16 gejunuloj deziras kontakton. Ĉu vi povas helpi al ni? Skribu al: Amikeco, Rudolf Burmistr, Grŭna bei Karl Marx Stadt, Kolektivo por popolaro – Wismut. DDR.

Antaŭ maskobalo

Krepusko enrigardas modestan studentan ĉambron, hodiaŭ agrable varman, en kiu ĉirkaŭ la tablo sidas tri junaj samideanoj, laŭte diskutantaj – evidente oni ĉi tie solvis gravajn problemojn! Kadir svingas antaŭ okuloj de du ceteraj veturplanon kaj flame defendas sian hipotezon, ke ni, volante viziti maskobalon en Brno, nepre devas veturi sole per persona vagonaro. „Memoru, ke uzonte rapidvagonaron ni elspezos 8 kronojn pli multe ol ...“ „ol veturonte 10 horojn per simpla trajno riskante eblecon de frostiĝo en komfortaj vagonoj kaj ceterajn vojaĝdanĝerojn“ aldonis mi. La tria s-ano jam kliniĝis al mia propono, kiu kvankam signifis iom pli grandan elspezon, tamen garantiis almenaŭ plej mallongan tempon necesan por atingi Brno kaj esti en stato, kiu permesas partopreni maskobalon. Sed Kadir ne volas cedi: „Rigardu“, triumfe ekkriis „tiamaniere ŝparitajn

kronojn reprezentas bonan tagmanĝon – eble lumbaĵon kun mirteloj ...“ kaj ŝmacis frandeme!

La tria, Ĉeněk, ekaŭdinte pri manĝo, tuj transiris al mia kontraŭulo, laŭte kriante, ke li ĉiam preferas veturi per simpla vagonaro, ĉar la ĝuo de vojaĝo daŭras pli longe.

Ekestis denove konfuzo, kiu pligrandiĝis, kiam mi menciis niajn maskojn. Estis decidite tuj iri en urbon kaj event. aĉeti ion „eksterordinaran“.

Akra aero nin bonakceptis. La urbo komencis sian vesperan kaj noktan vivon. La triopo iris kelkajn metrojn senvorte; ni ĉiuj en la pensoj mezuris aĉetforton de niaj monuoj. „Katastrofa situaci“ volis diri Kadir, sed mi ekkriis: „Diablo, rigardu!“

Proksimiĝis al ni danĝere aspektanta objekto. En normala vivo mi estas homo aŭdaca, sed mia interna voĉo diris tiumomente al mi, ke en simila okazo riskas nur malsaĝulo. Mi trenis miajn amikojn (kiuj, mizeruloj, eĉ ne supozis minacantan danĝeron) en malluman koridoron. La besto proksimiĝis ... Ne vane mi tion ŝatas zoologion ... mi tuj divenis, ke temas pri leopardo el gento de feleidoj. Mi konsterniĝis. En vespera mallumo mi vidas ion blankiĝi kaj tiriĝi post karaktere flava felo de la besto! Mi fermas la okulojn kaj per propra korpo defendas miajn amikojn. - Nun ĝi devas preterpasi! Mi malfermas, pro teruro larĝiĝintajn okulojn – sed – sangavida monstro transformiĝas je gracia fraŭlino en longega blanka robo, evidente rapidanta al maskobalo, ĉar en la mano ŝi portas maskon. Kaj ĉar regis forta frosto ŝi surhavis pelton el multekosta kuniklo, kiu similis al leopardo kiel ov' al ovo, ke eĉ spertan mian okulon ĝi sukcesis trompi ...

Denove m spiris kiel homo kaj eltiris sufokitajn amikojn el malluma koridoro, kaj malamo de miaj kolegoj subite degelis.

Denove mi disputis, ĉu veturi al Brno per rapidvagonaro aŭ simple. Eble pro troa krio, ni preterpasante „automat“ eksentis fortan kaj impertinentan malsaton. Iri en manĝejon estis per publika balotado malakceptite, ĉar eble povus manki mono por Brno ...

Mi proponis viziti ĉiujn parencojn kaj geamikojn en la urbo, esperante, ke ili tuj divenos nian malfacilaĵon kaj komprenos

Unua vizito estis en centro de la urbo. Ĉeněk demandis dommastrinon, ĉu hazarde s-ro N-vý ne estas hejme. Kadir kaj mi senvorte rigardis scenon. La virino kelkajn momentojn nin observis kaj poste konkludis, ke nia konduto estas suspektinda kaj diris severe: „Ne.“ kaj bum – ni restis en koridoro. Senvorte ni descendis malsupren (57 ŝtupoj!)

Kiel ni baldaŭ konvinkiĝis, ĉiuj niaj amikoj antaŭvidis en siaj sonĝoj, kiaj plagoj egiptaj minacas ilin kaj lasinte ĉion, ili preferis forveturi kelkajn kilometrojn ekster urbon. - Mi trame „vojaĝas“ al nia bona amikino, kiu hazarde loĝas tre malproksime – oni diras, ke en tiu kvartalo eĉ fantomoj terurigas Jen, numero 41, ŝtupoj, sonorilo, nenio – sonorilo kaj definitive nenio!!!

Ankoraŭ kelkajn amikojn ni vizitis, sed ĉiam vane. Elĉerpitaj ni fine aĉetis „špekáček“, kiu plenumis taskon de riĉa vespermanĝo (kiun ni supozis ĉe parencoj.) Ĉi tiun altnutran manĝon ni planis por tuta restanta semajno, por ŝpari 110 Kč – kiuj estis necesaj nur por vojaĝelspezoj.

Ni daŭrigis promenon tra la stratoj kaj interparolon. Nova aŭtomato aperis kaj mi, tute senpripense diris: „O, kiel bonegan koktelon ĉi tie oni havas!“ Konsternita rigardo de ambaŭ niaj kolegoj revenigis min al realeco. „Nia programo estas Brno kaj ne koktelo“, predikis Kadir. „Nur en Brno ni ĝuos ĉion, sed nun necesas ŝpari“ aldonis Ĉeněk. Ili pravis.

Ni enreviviĝis. Belaj virinoj, vestitaj por hodiaŭa maskobalo, kiujn ni renkontis surstrate, transportis nin en brilantan spegulan salonon, kie svarmas nediveveble maskitaj gesamideanoj, reve sonas muziko, belaj knabinoj dolĉe ridetas kaj niajn orelojn karesas Esperanta konversacio.

Jes, ni vivas jam venontan sabaton, la 19an de februaro.

La tripso disiĝas je la 22-a horo. Ni ĉiuj diras: Ĝis la revido en rapidvagonaro veturanta al Brno je la 6-a horo sabate. (Do tamen mia ideo de rapidvagonaro venkis!)

Ni revenis hejmen, sed anime ni jam estas en Brno kie atendas nin rondo de bonaj amikoj – esperantistoj.

Van

Somera esp. tendaro

Obávate se žít 14 pod stanem?

Nabízíme vám tedy jiné řešení. Podle telegrafické zprávy z Třebíče byla právě zajištěna pro vás místa v chatě v těsné blízkosti tábora.

Zajistěte si dovolenou již nyní. Plán kursů:

3.- 16. července - kursy A, B pro děti do 15 let.

17. - 30. července - kursy A, B pro začátečníky /A/, mírně pokročilé /B/

31.7 - 13. srpna - kursy C, D, konverzační /C/ učitelský /D/.

Přihlášky budou rozeslány všem skupinám a odběratelům Tagiĝa. Sledujte zprávy v našem esp. tisku. Přihlášky ještě nepřijímáme, poněvadž není zajištěn dostatečný počet stanů. Váš stan by nám velmi prospěl. Jste-li ochoten váš stan zapůjčit, sdělte okamžitě jeho rozměry. Děkujeme předem za vaši pomoc.

T á b o r u z d a r !

Sekretariejo: J an Werner, Brno, Helceletova 16.

Ĉu gajni novajn abonantojn?

Jes. Nia tasko estu plivastigi la abonantaron de Junularaj cirkuleroj. K i a l ?

Tagiĝo kaj aliaj cirkuleroj de Junularo donos al vi eblecon pli bone ellerni la lingvon, pliriĉigi la sciojn pri la Esp. movado kaj helpos krei amikan medion en viaj grupoj. Niaj cirkuleroj povas servi ankaŭ por interŝanĝo de literaturo kaj gazetoj en eksterlando. Ĉiun vian abonon por eksterlanda via amiko ni akceptas. Abonpago por unu jaro estas 8,- Kčs. Pagu al: ĉekkonto ĉe STSP Opava, čís. úč. 8155.

Tagiĝo ĝojas je novaj abonantoj!

Kion faras niaj grupoj?

El. Reg. delegitoj dum lasta monato sendis la raporton s-ano Novotný kaj s-ano Werner – kiuj sendadas raportojn regule, la resuman raporton por monatoj novembro – januaro sendis RD s-ano Čermák, sciigojn pri la agado venis ankaŭ de RD Křivánek kaj RD Franz el Pardubice ankaŭ post longa silentado revenis al ni. Denove multe ni ne scias pri la agado en Slovakio kaj certe nin ĝojus, se ankaŭ s-anoj el Bratislava kaj el Svit sendus al ni koncizan raporteton pri iliaj sukcesoj en Junulara movado en Slovakio.

Kaj nun kelkaj fragmentoj el la ricevitaj raportoj:

RD Novotný el Praha: Malgraŭ la malprecizaj aŭ tute neniam raportoj el Počepise, Karlovy Vary, Hříměždice dum la pasinta tempo la Esperanto afero denove kolektas ĉiujn fortojn por iom ektorni la agadon. Laŭ liaj vortoj: la ĉeesto dum la lastaj semajnoj estis tre malbona, kaŭze de ekzamenoj de la altlernejoj. Ni esperu, ke ili venkos tiun ĉi krizon kaj per komunaj fortoj de ĉiuj membroj ili montros al ni denove modelan agadon. Nova signo de verda vivo aperis en Koštany apud Teplice, kie s-ano Karel Vorlíček reveninte el soldatservo per ĉiuj fortoj eklaboris. Regiono Praha kaj nordaj partoj de Bohemio el al vigla poresperanta laboro!

Nova grupo ekbrilis en la regiono de RD s-ano Franc – Pardubice. Ĝi estas en Jablonné n/Orlicí ĉe okjara mezlernejo. Tre entuziasme eklaboris tie kaj gvidos la komencantan kurson por 20 partoprenantoj s-ano Stan. Werner, Těchonín 175, p. Mlaškov, kiu estas ankaŭ LD de la grupo. Aliaj scioj pri la regiono Pardubice ne estas. - Bedaŭrinde. Ni esperas, ke en venonta N-ro de

Tagiĝo ni jam povos pri reg. Pardubice raporti pli multe.

Reg. Sud-okcidenta Bohemio: Písek – La ĉeesto en la kunvenoj estis malforta. En la plano por la I-a kvaronjaro ili planas aranĝon de Esp. ekspozicio kaj kontakton kun la s-anoj el Strakonice.

Plzeň-Junularo prizorgis la programon dum la vespereto: „La Majstro vivas“ en la memoro de 95-a datreveno de naskiĝo de L. L.Zamenhof. Grupo volas eldonadi cirkuleron „Juna Esperantisto“ La Esp. vivo tie aktiviĝas.

RD Werner Jan – Brno. La 19-an de febr. junularo aranĝis la regionan kunvenon, kiel estas raportite en la alia loko de Tagiĝo. RD raportas, ke bona laboro vidigas en grupo de Třebíč, kiu vivas nun jam en la vigla preparado de Somera Esp. Tendaro kaj eĉ alie ili klopodas plialtigi la lingvonivelon de la junularo.

Regiono Olomouc: Bedaŭrinde venas neniam raportoj el tiu ĉi regiono. Tamen la junularo en Olomouc kaj ankaŭ en Přerov estas tre aktivaj kaj havas dum la kunvenoj belajn programojn. RD – venonte ni postulas raporton!!!

Regiono Ostrava: En januaro estis ŝanĝita la LD de Ostrava Junularo. La funkcion prenis s-ano Lad'a Adámek, OKD 304, Poruba u Svinova. S-ano Kočvara tre sukcesas en la Esp. kurso en Odborné učiliště pracovních záloh, kie lernantoj entuziasme Esperanton lernas. La ioma krizo en Junularo Ostrava iom post iom cedas lokon al pli bona perspektivo kaj al denova ekbrilo de ilia malnova tradicio.

Opava – De komenco de nova jaro aperis granda krizo en la grupo. Malgraŭ la sufiĉe bona ĉeesto en kunvenoj tamen la programo estis tre malbona. Kelkfoje ili kunvenis nur por tio, ke ili post duhora ĉeĥa interparolo pri flankaj aferoj denove foriru sen ia pliriĉiĝo de scioj Esperantaj. Dank' al Dio tiu tempo jam pasis kaj nun estas denove la programo bone preparita de ĉiuj niaj membroj. 2 kursoj por infanoj estas daŭrigataj. La kaŭzo de la malboniĝanta situacio en la grupo kaŭzis la foriro de kelkaj bonaj s-anoj en lernejon en aliaj lokoj. Opavanoj bruligu denove la torĉon de entuziasmo.

Tamen ni ne forgesu, ke en Opava aktive laboras maljuna kaj malnova esperantisto s-ano Frantl, kiu sen helpo de Junularo aktiviĝas en la laboro por pacmovado pere de Esperanto. Estas necese menci, ke s-ano Frantl instalas por la konferenco de Pacdefendantoj en Opava okazinta la 27.2.55 le ekspozicion pri la atomatakoj en Japanio, metinte tien la bildojn kaj Esp. librojn kiuj pritraktis tiun ĉi temon. Sur unu tabulo estis instalitaj diverslandaj eldonoj de Paco kaj Pacdefendanto. La ekspozicio ne rekte propagandis ankaŭ Esperanton. Bona rimedo sekvinda.

Dum la konferenco estis s-ano Frantl por lia bona laboro premiita per la premio (libro). La prezidantaro de konferenco antaŭ la ĉeesto de pli ol 250 delegitoj el la entreprenoj en distrikto Opava estis tralegitaj la tradukoj de leteroj de s-anoj el Göteborg kaj el Finnlando. La letero estis adresita al la Silezia verkisto Fran Směja, kiu ĝin ankaŭ tralegis kaj la komitato de Pacdefendantoj sendis al Svedujo kaj Finnlando la respondojn.

El la konferenco estis forsendita ankaŭ telegramo al urbo Coventry en Anglujo. Pri la afero Coventry vi certe legis en la cirkulero Pacdefendanto. En publika parolado s-ano Frantl deklaris ke li eluzos la sciojn de Esperanto en la laboro por Pacdefendantoj. Li priparolis publike la sukcesojn de Esperanto antaŭ UNESCO kaj priskribis la aferon de la urbo Coventry. La parolado de li estis per longedaŭra aplaŭdo akceptita.

Lia laboro estas vere krea kaj li ne timas publike deklari la servojn de Esperanto por Paco. Lia laboro estas imitinda.

Jak

Ni petas la legantojn pardoni al ni la malfruiĝon de ĉi tiu numero. Ĉio okazis pro teknikaj kaŭzoj. Nia multobligilo estas difektita, ni devis serĉi tial dume la alian eblecon por multobligado.

Por via pacienco ni dankas al vi

TAGIĜO

Okazis

Jes – okazis kaj okazas – kaj tio estas malbona afero – aŭ ne tre? Nu, ni ekvidu tion post pluraj klarigoj. Nia artikolo pli bone titolita, se ni prenis vorton el sprita poeto de Raymond Schwartz - „Edzino – fino!“

.... kaj la sorto estis senkompatema. Venis foje tempo kaj junan homon ekkaptis io stranga – iu fantomaĵo enpenetris lian koron, ĝi ŝajnis kiel dolĉega sonĝo – sed kiu jam estis maturiĝonta en amaran rikolton de estonta postedziga vivo. Vere bona afero – se ne tre ... la juna homo iam aktiva samideano trovas ne oportune dediĉi sin al bela ideo, li komenciĝas fariĝi egoisto kaj sindone enmetas la tutan proprecon en manojn de kara knabineto, bedaŭrinde li ne ttransdonas al ŝi tion, kion li iam amis – Esperanton. Tion li volonte enterigas kaj eble nur krokodilaj larmoj verŝiĝas la mortintan por li Esperanton en espero, ke faro de tio pliverdiĝos kaj tiel li helpos al ĝia fina venk'.

Dume adiaŭ karaj amikoj – mi estas por vi mortinta.

... kaj sufiĉis por li la ĉarma edzino, manetoj graciaj, lipoj dolĉegaj, okuloj profundaj, korpeto aminda ... sufiĉis? sed ne tre ...

Venis la tempo de riproĉoj de propra konscienco. Li provis reveni al la afero por kiu li antaŭe dediĉis multon de sia energio, sed ekestis obstaklo inter li kaj la Esperanta kolektivo, kaj ĝi estis la amata lia edzino. - Pluraj jaroj – pluraj spertoj, pli da aĝo – pli da saĝo – la rezulto? - ekkono pratempa – virino serpenta – ŝi viron delegis – homaro suferis – suferas – suferos - ... kaj kompatinda vireto devas ankaŭ suferi pro malsufiĉo de propra volo.

Bedaŭrinde ke ni samideanoj ne havas al ĉiuj junaj „edzomortintoj“ ludi la funebran marŝon, eble ĝi donus al pli da „postmorta“ kvieto kaj pli da paco en la konscienco

Ho kruela estas tiu malsano kiu trafas ĉefe la junajn homojn. Ĉu preĝi por la konverto de la trafitaj? Eble tio estas nenecesa. Ni lasu ilin mortadi kaj ni estu paciencaj. Tiajn homojn ni ne bezonas – homojn kun malforta karaktero – homojn egoismajn – por kiuj pli multe valoras varma familifajrujo kun komforta kaj amuza vivo antaŭ la feliĉo, frateco, interkompreniĝo kaj paco de la tuta homaro.

Ni kredu – esperu ke ĉiu nova paro
ne estos balasto por verda amikaro,
ni ne plu ripetiĝu – edzino – ho ve – fino,
ni ŝanĝu la esprimon - „edzino – helpantino“.

Valso

Soutěž na jednotný odznak Junulara

Junularo v Olomouci vypisuje soutěž na návrh celostátního jednotného odznaku JUNULARA v ČR.

Podmínky soutěže: Soutěže se může zúčastnit každý jedním nebo více návrhy.

Odznak (bílo-zelený) navrhňte na formátu A-5, uveďte přesnou adresu a jméno. Soutěž končí dne 1. července 1955. Došlé návrhy budou vyhodnoceny a odměněny esp. knihami. Návrhy zasílejte v obálkách formátu A-5 na adresu: Karel Fabian, Komenského 22, Olomouc

20 lernolibroj de Inĝ. L. Krajíc por niaj gekursanoj nepre bezonataj. Se estas eble, sendu baldaŭ al adreso: Stanislav Werner, Těchonín 175, pošta Mladkov.

Ŝipanaj aventuroj

24 jaroj, tio estas aĝo, kiam al multaj junuloj eniras ia skarabeto en la kapon kaj oni ekkomencas cerbumi, ke jam longe estis solaj kaj ke estus bone trovi por si ian agrablan kunulinon, kiu feliĉigus la homon, forgesante la vortojn de granda filozofo ke fraŭla homo lamentas, ke estas ĉiam sola,

edziĝinta homo kontraŭe lamentas, ke povas neniam esti sola. Similaj pensoj kaptis ankaŭ min, sed okazis io, kio denove resanigis mian penson.

En la haveno, kie ni ankris pro malmulte da akvo, staris apud ni alia ŝipo, kies personaro estis unu familio. Pli maljuna direktilestro kun sia edzino – ŝipano kaj filino – juna ŝipano. Krom ili estis sur ĉi tiu ŝipo ankaŭ malgranda hundo, kiu ĉiam ĉirkaŭkuris kaj gaje bojis, por esti ankaŭ utila, malgraŭ tio, ke lia salajro estis nur iomo da nutraĵo kaj multaj maljustaĵoj.

Estis la unua de la monato, tio estas tempo, kiam en nia entrepreno estas pagataj partopagoj por la laborantoj. Do iris ankaŭ la direktilestro por alporti la monon por sia ŝippersonaro. Antaŭ foriro aŭskultinte ankoraŭ neeviteblan admonon de la edzino, ke li baldaŭ revenu, ĉar estas necese veturi por terpomoj en butiko.

En kasejo li iom atendis kaj dum tiu tempo li interkonsentiĝis kun same atendantaj kolegoj, ke ili trinkos la glaseton en la havena drinkejo, ĉar estis malvarma vetero. Sed ĉe la glasetoj en rondo de amikoj kaj kolegoj ĉe gaja babilado kaj poste ankaŭ kantado, li tuteforgesis la admonon de la edzino, kiu jam perdis hejme la paciencon kaj iris serĉi sian edzon, timante, ke al li okazis io malbona. En kasejo ŝi konstatis, ke li de ĉi tie jam antaŭ longe foriris. Ŝia virina instinkto gvidis ŝin en proksiman havendrinkejon, de kie ĵus estis aŭdebla gaja kanto: „Mi ne iros hejmen.“

Kiel furio ŝi invadis gastejon, inter kantantoj ekkaptis la edzon – direktilestron, alpuŝiĝinte lian ĉapelon, kiun li havis sur la tablo sur lian kapon kaj ol la surprizita edzo rekonsciiĝis, li estis ekster la drinkejo. Li volis ion kontraŭdiri, sed peza ŝapiana mano de la edzino nenian diskuton permesis. Do poste li estis trenita tra la urbo kaj haveno al ŝipo por amuzo de la publiko, kies neniam mankas ĉe tia malofta riĉa okazaĵo.

Sur la ŝipo tamen sukcesis elgliti sin el manoj de la edzino kaj eble volis forkuri. Sed li stumblis kaj liaj okuloj, kiuj ĉion vidis duoble gvidis lian manon al ia ne efekta objekto por teni kaj li trasaltis la ferdekon kaj falis en la riveron. Sed rapide el najbara ŝipo li ricevis helpon kaj per ŝnuro li estis eltirita supren.

Deprimita li iris sian kajuton, kie jam atendis la edzino kaj kie li devis eltrinki la pokalon de sufero ĝisfunde.

Tia malhonorigo kaj suferado certe ne okazus al li, se li ne estus edziĝinta. Tiu okazaĵo donis novan direkton al mia penso kaj mi firme decidis resti ankoraŭ fraŭlo.

Sek

9. ELLERNI

Paĝo el literaturo

Post la unua mondmilito, ekbrilis sur la literatura ĉielo de Esperantujo stelo eksterordinare klara. Nova, freŝa talento aperis, kiu surprizis ĉiujn literaturamantojn. Lia unua poemaro, aperinta en jaro 1922 estis subskribita JULIO BAGHY.

Baghy naskiĝis en jaro 1891 en Hungarujo, estas interese, ke samjare naskiĝis K. Kalocsay, lia amiko kaj dua granda majstro de versoj, kiu famiĝis precipe pro sia tradukarto. Ambaŭ artistoj dum longaj jaroj ne konis unu la alian, kvankam iliaj vojoj estis paralelaj: en sama jaro 1911 ili fariĝis esperantistoj, en sama jaro transiris al IDO, kiu allogis junajn homojn, sed konvinkiĝinte, ke IDO estas vere nur "talpa fabrikaĵo", ili revenis samtempe al Esperanto, por kiu ili fidele laboris. Ankoraŭ unu komuna dato el ilia vivo: Kalocsay kaj Baghy komencis originale verki kaj aperis preskaŭ samtempe antaŭ Esperanta publiko. Kalocsay en jaro 1921 kun sia verketo "Mondo kaj Koro" kaj Baghy en 1922 kun "Preter la vivo". La meritoj de ambaŭ verkistoj koncerne evoluon de nia literaturo estas altaj. Ilia "Literatura Mondo", porliteratura ĵurnalo, aperinta en jaro 1922, kies celo estis: "doni lokon al ĉiu valora verko originala aŭ tradukita, varbi ĉiujn talentajn verkistojn, eble eduki novajn", fakte edukis multajn novajn poetojn kaj al simplaj literaturamantoj donis ĝuon el la plej belaj verkoj.

Baghy fariĝis nur originala poeto. Romantiko estas parto de lia koro kaj tiel sonas ankaŭ liaj versoj: jen admirinde delikataj, jen forte sonantaj. Li konsideras romantikon "kosmetikaĵo", kiu

plibeligas la vivon, io, kio estas parto de la efektiva vivo. Ĉar ĉio, kion Baghy priskribas en siaj verkoj, fontas plene el lia koro kaj animo – tial li estis kaj estas amata sincere de ĉiu esperantisto. Sed ne nur de ili. Liaj verkoj estis tradukitaj en multajn naciajn lingvojn: anglan, francan, germanan, estonan, finnan, svedan, nederlandan, polan, latvan, katalunan, hispanan, hungaran, ĉinan, japanan.

Baghy estas instruisto de ĉiu koncernanta poeto, kiu povas ĉe li studi belsonecon de la versoj, precizan formon kaj ritmon. Ĉiu komencanto-poeto ankaŭ memoru vortojn de Baghy pri la verkoj de Zamenhof: "Mi legis ĉiujn, eĉ la Fundamenton de Esperanto!" Vere, neniuj povas bone penetri spiriton de nia lingvo, ne leginte verkojn de ĝia Majstro!

Sed Julio Baghy ne nur verkis. Lia talento estis multflanka: li organizis, redaktoris, instruis, aktoris, prelegis, vojaĝis. Ni nur rememoru lian militkaptitecon en Rusujo, kie al multaj miloj estis de li Esperanto instruata.

Lia verkista laboro estis interesa kaj ofte eĉ tre rapida. Ekzemple al "Hura" originala romano, ampleksa, li dediĉis nur 34 tagojn, "Printempo en aŭtuno" bezonis nur 5 tagojn kaj "Verdaj Donkiĥotoj" semajnon. Lia edzino rakontas pri li, ke dum verkado estis tre interese lin rigardi: jen li ridas, gestas, krias, - jen ploras kaj imitas sonojn kaj ritmon.

Lia unua poemkolekto aperis en Budapeŝto en jaro 1922 kaj estis nomita "Preter la vivo". El liaj verkoj ni menciuj: Pilgrimo – migranta plumo, Dancu, marionetoj, Printempo en aŭtuno, Verdaj Donkiĥotoj, Teatra Korbo, Hura, Viktimoj, Sur sanga tero.

Legado de liaj versoj kaj prozo estas vera ĝuo. Eĉ simpla homo, ne kulturanta literaturon, estas ravita pro eleganta lingvo, belsonaj versoj kaj preciza ritmo de liaj poemoj.

"Dancu marionetoj" estas novelaro, kiu enhavas kelkajn plej fortajn novelojn el la tuta nia literaturo tiuspeca. "Viktimoj" kaj "Sur sanga tero" estas drastaj bildoj el rusa kaptiteco. Sian satiran talenton li montris en "Verdaj Donkiĥotoj" kaj romano "Hura".

Poemkolekto "Preter la vivo" estas libreto kun 124 paĝoj. La kolekton komencigas Dediĉo, kiu estas kvazaŭ prologo. Ĝi estas poemo de eminenta poeta forto. Sekvas la partoj: Tra Siberio, Tra l' Oceanoj, Ĉe la ruinoj, Kantantaj kordoj.

Ĉiuj partoj menciitaj enhavas poemojn belegajn, plenajn de emocio. La ritmo, kiun scias Baghy kaŝi en siajn rimojn, estas ĝojiga por la animo (vidu Ama danco, Momentoj ...) La rimoj estas ne artefarite metitaj, sed fluas facile kiel plaŭdanta rivereto. Krom la beleco forma, kaŝas la poemoj profundajn pensojn filozofiajn. Baghy estas antaŭ ĉio Homo kaj Homeco estas por li plej alta idealismo, kiu devas nepre esti atingita per amo.

En la parto de poemoj verkitaj en Siberio sonas melodio kontraŭ milito, kontraŭ blinda subpremo carisma kaj ni sentas tie pensojn efektive progresemajn.

Laŭ enhavo kaj laŭ formo estas interesaj: Ploro kaj konsolo, Interrompita romano, Larmoj de Kristo, Dolora deziro, Turmentaj demandoj, Krioj de mizero, Milita fabelo kaj multaj aliaj.

Ĉiama devizo de Baghy estis: Amo kreas pacon, paco konservas homecon. Homeco estas la plej alta idealismo!

K a r a l e g a n t o ! Ne forgesu kaj nepre elpruntu iun libron de Baghy. Por komenco mi rekomendas "Preter la vivo". Ni volonte prezentus ĉi tie pli longajn fragmentojn, sed bedaŭrinde manko de papero tion ne permesas. La poemo "Mia patro kaj mi" estas grava, ĉar klarigas lian sorton.

Certe plaĉis al vi ĉi tiuj kelkaj fragmentoj. Kaj vi ankoraŭ ne legis nekompereblan "La maro furiozas"!! Do ne forgesu prezenti en via Junularo malgrandan programon el poemoj de Baghy; ili certe altiros intereson de viaj membroj kaj samtempe pruvos al ili belecon de nia lingvo!

Por fermi ĉi tiun rakonton pri unu el niaj plej grandaj, mi aldonu nur, ke Julio Baghy vivas nun en Hungarujo, en cirkonstancoj ne tre enviindaj. Ni ĉiuj kredas, ke li konstante pliriĉigas nian literaturan trezoron, eĉ en malfacila situacio, kaj samtempe dankas al li pro granda verkaro, la gemoj, kiujn li donacis al ni.

Van